

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

BEA SUR NOVA
VOJO

•

ESPERANTO
KAJ JUNULARO

•

SORTO DE E-
LERNOLIBRO

•

LA PLEJ FORTA
ARMILO

•

E-TURISMO

•

KIO ESTAS
KOMPUTILO?

•

IMPRESOJ PRI
JAPANIO

•


ENLANDA
MOVADO

•

INFANA PAĜO

•

DISTROJ



JARO 54 • N-RO 4 • APRILO • 85

LA HOMO—TIU ĈEFA FORTO

„La scienc-teknika revolucio permesos al ni levi al nova pli alta nivelo nian socialan politikon, starigi kaj solvadi laŭ nova maniero, per novaj rimedoj la problemojn pri evoluo, vivkondiĉoj, ĉiufanka materiala kaj spirita progreso de la homo.

TODOR ĴIVKOV

(El lia raporto antaŭ la plenkunsido de CK de BKP, okazinta la 12-an kaj 13-an de februaro j. k.)



Junulara impeto
Grafikaĵo: G. Trifonov

Ni vivas en la jarcento de aŭtomatiko, de programita produktado, de grandaj kaj malgrandaj komputiloj. Sed ne malofte, serĉante kaj enkondukante en la vivon la plej novajn kaj modernajn atingojn, ni forgesas pri la homo. Admirante la obeemajn robotojn, ni malmulte pensas pri la inĝenieroj, kiuj konstruis ilin, pri la programistoj, laŭ kies volo robotoj moviĝas kaj funkcias. Ni zorgas pri senriproĉa funkciado de la maŝinoj, sed ne atentigas sufiĉe pri la homaj sentoj, streboj, pasioj kaj eraroj. Ni perfekte konas la leĝojn pri funkciado de maŝinnodoj kaj detaloj en agregatoj, sed ni malmulte zorgas ellerni tiujn fortojn, kiuj gvidas la homan konduton. Des pli malmulte ni faras por turni tiujn fortojn al direkto, kiu koincidas kun la direkto de la socia evoluo sur difinita etapo, kaj tiamaniere garantii la necesajn kondiĉojn por krea agado de ĉiu aparta persono. Ĉar — kiel emfazas iuj esploristoj, la personeco ne estas bolto en la socia mekanismo, sed ĝia plej grava funkcia ĉenero.

Revolucia pensado, kaj des pli revolucia agado estas eblaj nur en medio, kie ekzistas la necesaj moralaj-psikologiaj premisoj. En tia medio kritiko kaj memkritiko prenas la

formon de krea diskutado, de libera esprimo de opinioj, kiuj iom post iom kristaliĝas en ideoj antaŭenpuŝantaj la evoluon. Ĉu estas multaj la gvidantoj, kiuj kreas kondiĉojn por ekzistado de tia medio, ĉu ili konas siajn subulojn ne nur kiel nomojn kaj oficojn, sed ankaŭ kiel moralajn ecojn, kiel psikon kaj kreoblecojn? Kaj ĉu troviĝas inter ili tiaj, kiuj zorge kreskigas la kreogermojn ĝis kiam ili donos fruktojn?

Homoj-kreantoj, kapablaj diskonigi novajn, revoluciajn ideojn aŭ obstine batali kontraŭ ĉio malnova, malmoderna, foje havas malfacilajn karakterojn. Tre ofte ili estas kvalifikataj „konflikta persono“ nur pro tio, ke ili pensas netradicie, distingiĝas de la ceteraj. Al tiaj homoj ne malofte gvidantoj, kolektivo kaj eĉ partia organizaĵo manifestas nepraviceblan malkomprenemon, kiu foje transformiĝas en malkaŝan kunpuŝigon. Ekestas konflikto, sed ĝi aperas ne pro kulpo de la „konflikta persono“, ĝi nur manifestiĝas pere de tiu persono.

En tia kolektivo estas malfacile paroli pri teknika progreso, pri plej modernaj labormetodoj. En malbona psika atmosfero ne povas maturiĝi revolucia pensado, ne estas eblaj revoluciaj agoj. Tie la homaj fortoj kaj tempo vane eluziĝas, iliaj kapabloj forvelkas, en ili enlokiĝas, apatio kaj senforteco. Tio estas nestoj por bredado de socie pasivaj individuoj, kiuj estas parto de la socio, sed servas nur kiel balasto, ne kiel aktiva forto en ĝia disvolvo.

Per la homo komenciĝas ĉio, kaj ĉion oni faras por la homo. Oni ne povas programi homon kiel roboton, sed tjes kreas esencon oni devas malkovri kaj doni al li agadkampon. En ĉiu homo ekzistas grandega kreosargo, serĉanta eliron. Ne temas nur pri profesioj, kiujn laŭkutime oni nomas „kreaĵ“. La studoj klare montras, ke la laboristoj en nia lando, precipe la junaj, jam ne kontentiĝas nur havi laboron kaj ricevi salajron. Ili volas havi laboron, kiu permesos al ili manifesti siajn kapablojn, ricevi kontentiĝon de kreantoj en sia laboro.

Jen al tiu grandega forto ni devas nin turni nun, kiam ni strebas pensi kaj agi revolucie.

Esperantigis: STOJAN KOSTADINOV



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 54

APRILO

4 • 1985

BEA SUR NOVA VOJO

ĤRISTO GOROV,
prezidanto de BEA

Dum la forpasintaj kvin jaroj nia Asocio plenumadis siajn specifajn taskojn, gvidante sin per la Statuto.

BEA ludis gravan rolon por plialtigo de la internacia aŭtoritato de nia landa movado. Bulgaraj aktoroj, kantistoj, lektoroj kaj sociagantoj gastis en dekkvin eŭropaj kaj ekstereŭropaj landoj, prezentis teatraĵojn, koncertojn kaj recitalojn, raportis pri la naciaj jubileoj de nia ŝtato kaj pri la 75-jara datreveno de nia Asocio.

La proksimiĝanta 100-jara jubileo de Esperanto stimulis aktivecojn sur la Balkana Duoninsulo. Jam dufoje balkanlandaj esperantistoj avis kongreson en Sofio kaj Ateno. Oni interŝanĝis ideojn pri komuna celebrego de la Jubileo.

Dum la pasintaj interkongresaj jaroj la Centra Estraro de BEA, helpata de la distrikta estraroj, organizis landajn konferencojn — lige kun la 1300-jara jubileo de la bulgara ŝtato (Sumen, 1981), 100-jara naskiĝtago de Georgi Dimitrov (Sofio kaj Pernik, 1982), 75-jara jubileo de BEA (V. Târnovo, 1982), 60 jaroj de la Septembra Ribelo (Stara Zagora, 1983) kaj la 40-jara jubileo de socialisma Bulgario, al kiuj aligis reprezentantoj de alilandaj asocioj. Siaflanke pluraj distrikta estraroj organizis regionajn aranĝojn. Ĉio ĉi helpis por ideologia edukado de la esperantistoj en la spirito de la fama poeto:

... Same fidelaj al hejma altar',
ni sentas nin filoj de tuta homar'.

La decido de la Ministerio de Popola Klerigado pri fakultativa enkonduko de Esperanto en la mezlernejoj estas grava sukceso. Per ĝi ni gajnas la simpatiojn de instruistoj kaj ĝlernantoj, multaj el kiuj venos al nia movado kaj reunigos ĝin. Jen vasta varbokampo por nia junulara sekcio.

La Internacia Esperanto-Kursejo funkcias normale kaj estigis loko, kie renkontiĝas bulgaraj kaj alilandaj esperantistoj, plibonigas sian kvalifikon.

La organiza stato de la Asocio grave stabiligis. En ĉiuj distriktoj funkcias estraroj. Iuj el ili bonege laboras, aliaj — meze bone,

la ceteraj ankoraŭ paŝas pene. Ankaŭ dekoj da societoj aktivas.

Pluraj sekcioj distingiĝis per aktiva laboro, pruvante, ke Esperanto estas utila por neesperantaj fakaj organizaĵoj. Aparte menciinda estas la sekcio de IFEF, kiu organizis la 36-an internacian kongreson de tiu organizaĵo. Niaj atingoj estas sendube ŝuldataj al la favora rilato al nia afero far oficialaj instancoj.

El ĉio supredirita ne sekvas, ke ni atingis la plej altan montopinton. Ĉirkaŭrigardante, ni konstatas, ke antaŭ ni staras ankoraŭ pli alta pinto, kiun ni devas ascendi. Tiu pli alta pinto estas nomata evoluanta socialismo, al kiu ni strebas. Al ĝi iras nia popolo, gvidata de la hardita en klasbataloj partio.

Kion do devas entrepreni BEA por supreniri tiun altan pinton?

— BEA ankoraŭ pli intime unuigu ĉirkaŭ la avangardo, kiu gvidas nin al venko.

— En la scienc-teknika progreso BEA trovas sian ĝustan lokon, tio estas ke ĝi plenumu siajn novajn taskojn, se ne volas esti kiel postresta soldato en armeo atakanta la malamikon, t. e. la ĝisnunajn konceptojn kaj malnovmodajn ideojn.

— BEA daŭrigu la edukadon de la esperantistoj, ĉar sen revolucia teorio la praktiko estas blinda. Ĉiu el ni devas ŝanĝi sian pensmanieron favore al la nova stadio sur la vojo al matura socialisma socio.

— Ĉiu esperantisto devas perfektigi en la lingvo, posedi ĝin skribe kaj parole, ĉar nuntempe multaj nialandaj esperantistoj krokodilas, t. e. parolas bulgarlingve en internacia medio.

— Niaj gvidantoj estu iniciatema, aŭtoritataj, bonaj organizantoj, unuvorte — motoroj de la movado.

— Ĉiuj ni strebu al altnivelaj poresperanta propagando kaj eduklaboro, celantaj altkvalitan informadon al la neesperanta publiko.

Niaj pensoj kaj laboro iru ĉiam en direkto, kiun postulas la nova epoko — la epoko de scienc-teknika revolucio!

Jen estas la nova vojo de BEA.

ESPERANTO KAJ JUNULARO

Por la junularo Esperanto estas fenestro al la mondo, ebleco alpaŝi al novaj suproj de homa kono. Krome, ĝi estas lernejo de humaneco, de homa progreso, lernejo por edukado de la junularo en spirito de patriotismo kaj internaciismo. Ni rememoru, ke en la jaroj de sanga faŝista diktaturo la bulgaraj gejunuloj lernis, disvastigis kaj aplikis la internacian lingvon Esperanto kiel efikan armilon en la batalo por paco, internacia komprenigo kaj progreso.

En la maltrankvilaj tagoj, kiujn nun travivas la homaro, la junularo el la tuta mondo leviĝas kontraŭ la terura danĝero de atoma apokalipso. Ne estas hazarda la fakto, ke la Generala Kunveno de Unuiĝintaj Nacioj, konsiderante la historian rolon de la junularo en la pacbatalo, akceptis en sia 34-a sesio rezolucion, per kiu ĝi proklamis la kuran jaron 1985 kiel Internacian Junularan Jaron. Tial la junaj esperantistoj el ĉiuj landoj opinias sian unuan devon en tiu signifa jaro unuigi siajn fortojn en la nomo de paco kaj amikeco inter la popoloj.

En sia 41-a kongreso, okazonta en julio j. k. en Sofio, la bulgara esperantista movado raportos pri aktiva partopreno de la junularo en lernado, aplikado kaj disvastigado de la Internacia Lingvo. Ĉiam pli rezultodona estas la agado de la juna esperantista taĉmento en naciaj kaj internaciaj forumoj. Kreskas la nombro de gejunuloj, kiuj lernas Esperanton en fakultativaj kursoj de la mezaj politeknikaj lernejoj kaj en altlernejoj.

Kaj tamen la partopreno de la junularo en la E-movado en nia lando estas tre modesta. Ĝi respondas nek al ties amplekso en la pasinteco, nek al la nun ekzistantaj ekskluzive favoraj kondiĉoj — rezulto de la grandegaj sukcesoj en la ekonomia, socia kaj kultura evoluo de nia lando dum la kvardekjara periodo de libera vivo. Tial en la konferenco de UE de BEA en Sofio, okazinta la 13-an de februaro j. k., oni alarme starigis la demandon, ke la junularo en nia lando ĉiam ankoraŭ estas tre malproksime de la E-movado.

La kaŭzon pri tiu nekontentiga stato ni devas serĉi antaŭ ĉio en ni mem, en la E-movado mem, kiu ĉiam ankoraŭ pagas imposton al la strebo „altiri“ gejunulojn kiel membrojn de la E-societoj. Ni atendas, ke la junularo mem venu, eniru la E-movadon, anstataŭ estu la malo — la E-movado estigu karakteriza trajto de la junularaj organizaĵoj. La internacia lingvo Esperanto povas esti tre utila en la proceso de edukado kaj formado de la

junularo kiel multflanke preparitaj por plej plena memrealiĝo homoj.

La bulgara E-movado trovas ĉiam pli multajn adeptojn inter la junularo ĉe ni, se ĝi starigos intimajn kontaktojn kun ĝi kaj kun ĝia organizaĵo — la Dimitrova Junulara Komunista Unuiĝo (DJKU), se ĝi kontribuos por plenumo de la celoj kaj taskoj, kiujn tiu ĉi organizaĵo starigas al si. Starante sur tiaj pozicioj, ni devas transformi la lernadon kaj aplikadon de la Internacia Lingvo en rimedon por plivastigo de la internaciaj kontaktoj de la junularo, precipe dum la antaŭstaranta XII Tutmonda Festivalo de la Junularo en Moskvo, kaj por sukcesa realigo de la Internacia Infana Asembleo „Standardo de la Paco“, okazonta ĉi-jare en nia lando. Krome, Esperanto devas transformiĝi en rimedon por kvalita plibonigo de la junulara laboro, por ekspozado de la atingoj de scienco kaj tekniko; ĝi devas kontribui por la multflanka sinpreparo kaj plenalora memrealiĝo de la nuntempa juna generacio. Kaj tio signifas, ke per siaj specifaj rimedoj kaj formoj de efiko la E-movado devas kontribui por efektivigo de la taskoj, kiujn Todor Jivkov starigis en sia letero al la bulgara junularo, por plenumo de l' decidoj de la XIV kongreso de DJKU.

Nur kiam la junularo eksentos la grandegan utilon de la Internacia Lingvo por plivastigo de la internaciaj kontaktoj, por lernado kaj aplikado de la avangarda monda sperto en la sfero de produktado, scienco, tekniko ktp, nur tiam Esperanto estiĝos praktike necesa ne por unuoj, sed por miloj. Kaj tiam la vicoj de la bulgaraj esperantistoj, nature, pleniĝos per novaj membroj el la medio de la junularo.

Por krei solidan ponton inter Esperanto kaj la junularo, estas necesaj ne nur solidaj kontaktoj kun la junularaj organizaĵoj. Necesas ankaŭ klare kaj ĝuste difini la celojn kaj taskojn, estas necesaj aktivaj kaj sindonaj laboruloj, grandega klariga kaj propaganda agado, preparo de instruistaj kadroj, de lernolibroj. Do, estas necesa sistema laboro por disvastigo de Esperanto, por altiro de la junularo al lernado kaj aplikado de la Internacia Lingvo.

La bulgaraj esperantistoj klare konscias la grandegan gravecon kaj rolon de la estonta generacio en la E-movado ĉe ni, generacio, kiu inde prenos kaj portos la standardon de espero kaj paco.

ĤAIM LEVI

Konfarenco pri junularaj problemoj

La partoprenintoj en la konferenco de la ĉefurba E-organizaĵo ĉeestis nekutiman forumon. En ĝi ne nur estis difinitaj la delegitoj por la 41-a kongreso de BEA, oni ankaŭ vigle pridiskutis tre aktualan por ni esperantistoj problemon en la Internacia Junulara Jaro — „Esperanto kaj la ĉefurba junularo“. Pli ol 3 horojn daŭris la diskutoj, kiujn partoprenis 15 personoj. Ili ne nur serĉis la ĝustan vojon por altiĝo de la sofia junularo al la E-movado, sed ankaŭ la rimedojn por reteni la junajn homojn en niaj vicoj. Oni pritaksis la aktivadon de la urba junulara societo „Vasil Levski“. Detalan raporton faris Ani Sotirova — membro de la Buroo de UE de BEA. Si atentigis pri la neceso estonte organizi specialajn iniciatojn por la junularo. Lige kun tio oni devas trovi taŭgan ejon por junulara E-klubo. Krome, oni pridiskutis la zorgojn fare de la urbaj subdistriktaj societoj por la juna esperantista generacio.

En sia emocia, konkreta raporto la vic-

prezidanto de UE de BEA Haim Levi emfazis, ke ni esperantistoj devas altiri la gejunulojn en niajn vicojn. Tiucele ni devas labori kune kun la Komsomolo. Per Esperanto oni edukas la junajn homojn esti patriotoj kaj veraj internaciistoj. Sed per la Internacia Lingvo ili povas efektiviĝi ankaŭ siajn eblojn.

Tiujn problemojn tuŝis ankaŭ Tonĉo Krâstev, Steliana Dimitrova, d-ro Marin Balĉev, Mihail Ĉobanov, Dimităr Mutuŝev, Nikola Nikolov, Lasto Nikov, Marin Băcev k. a.

La reprezentanto de UK de BKP Georgi Petrov substrekis la multflankan subtenon, kiun la soci-politikaj institucioj donas al nia E-movado. Li alvokis pri bulgarlingva propagando de la Internacia Lingvo inter bulgaroj, por ke la noblaj ideoj de Esperanto atingu la konscion kaj la korojn de niaj samlandanoj.

MARIA JANKOVA

40 jarojn Asocio de Sciencaj Laboristoj en Bulgario

Fine de oktobro 1984 en la Nacia Palaco de Kulturo „L. Jivkova“ en Sofio okazis solena jubilea celebrego dediĉita al la 40-jariĝo de la Asocio de Sciencaj Laboristoj en Bulgario (ASLB).

Antaŭ 1100 sciencistoj el la tuta lando kaj kelkaj gastoj el eksterlando, lige kun la fondiĝo kaj agado de la Asocio raportis ĝia prezidanto akademiano Kiril Bratanov. Li informis, ke la Asocio estas fondita la 30-an de oktobro 1944 de 16 sciencistoj, el kiuj 11 jam forpasis, kaj nun ĝi havas ĉirkaŭ 8000 membrojn.

Parolante pri la agado de ASLB, akademiano Bratanov, kiu estas ankaŭ vicprezidanto de la Monda Federacio de Sciencaj Laboristoj (MFSL), interalie diris, ke la Asocio eldonas la organon de MFSL — revuon „Scienca Mondo“, ankaŭ en Esperanto. „La esperantistoj — li diris, — disvastigante la revuon tra la tuta mondo, diskonigas ankaŭ la ideojn de la fondiĝo de Monda Federacio de Sciencaj Laboristoj — Frédéric Joliot-Curie, pri paco sur la Tero, pri amika kunlaboro de la popoloj, pri apliko de la scienco nur por la bono de la homaro. Tiu ĉi eldiro evidentiĝas, ke la tre aŭtoritata monda organizaĵo — la Monda Federacio de Sciencaj Laboristoj, rekonas Esperanton kiel valoran rimedon por interkompreniĝo de homoj diversnaciaj.

En multaj rilatoj la agado de la Monda

Federacio de Sciencaj Laboristoj kongruas kun la batalo de la progresemaj esperantistoj kontraŭ la reakciaj imperiistaj instigantoj de milito, precipe kontraŭ la nukleaj armiloj. Ni, esperantistoj, havas nian mondan pacorganizaĵon — Mondpaca Esperanto-Movado (MEM), kies organo, revuo „Paco“, batalas kontraŭ la milito, por paca kunekzistado, malgraŭ la diferenco de ideologiaj konceptoj kaj ekonomia sociordo, kaj MFSL havas sian organon, la revuon „Scienca Mondo“, kiu defendas la samajn ideojn. En ĉiuj ĝiaj numeroj troviĝas artikoloj kontraŭ la milito kaj vetarmado. Por ilustriti tion, mi proponas al la atento de la legantoj nur kelkajn titolojn en n-ro 3/1983: „Kvalita vetarmado — nova kvalito de la minaco“, „La scienco devas servi al la paco“, „Internacia juro kaj prevento de la nuklea milito“, „Ekonomiaj ligoj kaj paca kunekzistado“, „Milito, paco kaj devo de la sciencistoj“, „Marx — la sciencisto“ k. a.

La bulgaraj esperantistoj kaj tiuj el la tuta mondo kun granda respekto rilatas al la agado de la Monda Federacio de Sciencaj Laboristoj, subtenas ĝian agadon kaj batalon kontraŭ la vetarmado, por paco en la mondo.

Pro tio ni alvokas: ĉiu esperantisto — abonanto de „Paco“ kaj de „Scienca Mondo“!

MINKO CONKOVSKI

La sorto de Esperanta lernolibro

Temas pri la lernolibro de Sergej Rubljov „*Esperanta rondeto*“, aperinta en du partoj. De 1927 ĝis 1936 la rusa eldono de la unua parto atingis 110 000 ekzemplerojn. Ĝi estis tradukita en multajn lingvojn: germanan, francan, ukrainan, bulgaran.

En Bulgario Asen Grigorov tradukis kaj adaptis ĝin por bulgaroj sub la titolo „*Proleta kurso de Esperanto*“ (1932). Li aparte verkis ankaŭ metodikan aldonon — „*Kiel instrui Esperanton laŭ la praktika, rekta metodo de S. Rubljov*“.

Per tiuj lerniloj oni gvidis laboristajn E-kursojn ĝis 9. IX. 1944. Post la popola venko la lernolibro, bazita sur la metodo de Rubljov, aperis en amasaj preskvantoj kaj provizita per pli detalaj gramatikaj notoj.

Ciu libro havas sian propran sorton. Iuj ne elvokas grandan intereson kaj baldaŭ estas forgesataj. Aliaj estas multe legataj kaj laŭdegataj de la samtempuloj, sed pli malfrue neniue rememoras pri ili. Tamen ekzistas libroj persekutataj, neniigataj, kiuj influas sur multajn generaciojn.

Ne nur en la Mezepoko estis brulŝtiparoj, ne nur tiam ekzistis „*Index librorum prohibitorum*“ (nomaro de malpermesataj libroj). Pruvo de tio estas kelkaj dokumentoj, pri kiuj disponas la Bulgara Esperanto-Muzeo.

La unua dokumento, kun dato 23. XI. 1935, estas ordono por konfiskado No 6 de la Sofia Distrikta Juĝejo al la polico: „Pro tio ke per sia enhavo la libro „*Proleta kurso de Esperanto*“ de S. Rubljov, praktika gvidilo por ellernado de la internacia lingvo Esperanto, adaptita por bulgaroj de M. L.*, eldonita en 1932 de la Laborista Esperantista Asocio en Bulgario, instigas la bulgarajn civitanojn al malamikeco kaj malamo kontraŭ la aŭtoritatoj kaj kontraŭ apartaj klasoj de la loĝantaro, — krimo laŭ paragrafo 7 de la Leĝo por Defendo de la Ŝtato...“

Aparta dokumento de 11. XI. 1935 prezentas eltiraĵojn el la sama libro, krimkulpigita laŭ la Leĝo por Defendo de la Ŝtato, § 7.

La „dangeraĵ“ lokoj en la libro, laŭ tiu dokumento, estas jenaj:

§ 12, paĝo 22

„Ni parolas pri Oktobra revolucio.

— Kamaradoj, kiam estis Oktobra revolucio?

— Ĝi estis en la jaro mil-naŭcent-deksepa. Ĝi estis antaŭ dekkvin jaroj.

— Ĉu Oktobra revolucio estis la unua revolucio en Rusio?

— Ne, ĝi estis la tria.

— Kiam estis la unua?

— La unua estis en la jaro mil-naŭcent-kvina. Post la unua revolucio en Rusio estis reakcio dum ankoraŭ dek du jaroj. Poste komenciĝis la granda eŭropa milito.

— Ĉu vi povas priskribi la jubileon?

— Jes, mi povas. La bulgaraj laboristoj faris akciojn. En multaj urboj kaj vilaĝoj laboristoj skribis sur domoj klasbatalajn sloganojn kaj metis ruĝajn flagojn kaj flagetojn. En urbo Provadia estis kvardek ruĝaj flagoj. Estis ankaŭ demonstracioj. La faŝista polico arestis kaj inkviziciis tre multajn kamaradojn en la lando.“

§ 18, paĝo 35

„Karaj amikoj, mi skribas al vi el la lando, kie regas la faŝistaj banditoj, kie regas la blanka teroro. Antaŭ kelkaj tagoj faŝistoj atakis la domon de la laborista kooperativo en nia urbo. Ili ankaŭ neniigis la kooperativan bibliotekon. Kiam faŝistoj volas mortigi iun komuniston, tiam ili faras tiun ĉi aferon tre facile. Ili faras mortigojn ne nokte, sed tage. Antaŭhierau mi vidis, kiel oni mortigis tute libere komuniston, kiu iris sur la strato (en la centro de la urbo). Sed mi pensas, ke finfine venos la tempo, kiam ni neniigos la nigran faŝistan registaron kaj ni havos ruĝan laboristan-kampanan registaron. Vivu la tutmonda proleta fronto!“

La lasta dokumento estas cirkulero de 29. XI. 1935, de la Direkcio de Polico al la distriktaj policaj inspektoroj, al la ĉefo de la ĉefurba polico, al la ĉefdirektoro de Poŝto, Telegrafo kaj Telefono kaj al la Nacia Biblioteko por konfiskado de kvar libroj. La kvara laŭvice en tiu listo estas „*Proleta kurso de Esperanto*“.

En ĉi tiu ago de la bulgara polico oni povas vidi la influon de la dekreto de la Regna kaj Prusa ministro de scienco, edukado kaj popolklerigo Bernhard Rust (de la 17-a de majo 1935), per kiu estis malpermesita en Germanio la instruado de la Internacia Lingvo. La malamikeco de Hitlera Germanio rilate al Esperanto atingas sian kulminon en 1935—1936, kiam post la Dekreto pri malpermeso de la instruado de Esperanto, oni malpermesis ĉiujn Unuiĝojn de Artefaritaj Lingvoj kaj iliajn grupojn.

El la ĉi-supre menciitaj dokumentoj oni povas konstati la saman tendencon ankaŭ en Bulgario.

En la nuna tempo la bulgara eldono de la lernolibro de Rubljov (malmultaj ekzempleroj

de kiu konserviĝis post la persekutoj) estas konsiderebla kiel malgranda enciklopedio pri la bulgara laborista Esperanto-movado. Sur ĝiaj paĝoj reviviĝas la figuroj de tiam junaj laboristoj-esperantistoj — Simeon Petrov, Atanas Lakov, Tinka Kolarova, Meleško Šiškov. Ni legas la leterojn de iliaj fremdlandaj samideanoj kaj korespondantoj — itala metalingvistoj, rusa kaj germana laboristoj, la artikolojn en tiamaj gazetoj. Ege interesaj estas la notoj pri konferenco de laboristaj korespondantoj (labkoroj), pri ekskurso organizita de la Laborista Partio, pri senlaboruloj-transportistoj,

pri kunvenoj de la juĉbunara* kvartala grupo de la Sofia sekcio de LEA (Laborista Esperanto-Asocio). Apartaj lecionoj temas pri la Kongreso de la Internacio de Proletaj Esperantistoj (IEP), pri la Bulgara Laborista Esperanto-Asocio kaj ĝiaj eldonaĵoj, pri la Internacia Laborista Esperanto-Movado.

Tiu 64-paĝa libreto estis grava armilo en la batalo de bulgaraj progresemaj esperantistoj.

PAULINA LAZAROVA

*Juĉbunar — malriĉula kvartalo en iama Sofia

NOVA ELDONO DE POEZIA ESPERANTO-ANTOLOGIO

Poezio „estas la plej sublima formo, en kiu oni povas vesti la homan penson“.

Lamartine

Por soleni la 100-jariĝon de Esperanto — kiel lingvo, movado kaj literaturo, UEA eldonis plian imponan volumon el la planitaj libroj — „Esperanta Antologio. Poezmoj 1887—1981“, kompilita kaj redaktita de William Auld, kun postparolo de la redaktoro. Tiu verko estas trafe relaborita kaj konsiderinde kompletigita.

En la postparolo la kompilinto revenas al la periodigo de Esperanta belliteraturo kaj konturas kvar periodojn:

1887—1921 (Primitiva Romantismo); 1921—1931 (Matura Romantismo); 1931—1956 (Parnasismo) kaj 1956—1982 (Postparnasismo)

Auld estas kaj poeto kaj literatur-historiisto. Li faris pioniran laboron por periodigo de la Esperanta belliteraturo, tamen li ankoraŭ ne atingis ĝenerale akcepteblan solvon. Tio okazis pro liaj supertaksado de la Esperantistaj eventoj en la jaroj 1921 kaj 1956 kaj subtaksado de la

ligo inter belliteraturo kaj socia vivo.

La monda imperiismo kaŭzis ĝis nun al la homaro du mondmilitojn kaj ĉiu el tiuj estas nedisigeble ligita kun la pacperiodo antaŭ la koncerna mondmilito, tial la periodoj devus esti:

1887—1917/18 (Romantika Optimismo); 1917/18—1945 (Kontraŭfaŝisma Optimismo) kaj 1945 — daŭras (Pacdefenda Optimismo).

La jaro 1921 certe povas esti uzita por apartigo de subperiodoj. Dum la tempospaco post la Granda Oktobra Socialisma Revolucio kaj post la Unua Mondmilito — 1917/18—1921, aperis kaj unike ekbrilis la socialisma E-poezio en la versoj de E. Miĥalski, en la versaj satiroj (1917) de Boris Mirski (Bela Manto), en la nova himno „Ruĝa Marseljezo“ (1922), en la poemoj de V. Eroŝenko (1923), por atingi sian unuan kulminon per la poezio de la eminenta triopo N. Nekrasov — „Krono de Sonetoj pri Esperanto“ (1927) N. Hohlov — „La Tajdo“ (1928) kaj E. Miĥalski — „Prologo“ (1929).

Efektive K. Kaloczay debutis per poemaro „Mondo kaj Koro“ en 1921, sed oni ne devas fari el pajlero trabon, ĉar la ĉefaj poemoj en tiu kolekto

iom poste estis reverkitaj. K. Kaloczay kiel poeto aperis en kolosa dimensio dek jarojn poste, per siaj tri poemaroj sinsekve aperintaj — „Streĉita Kordo“, „Rimportretoj“ (ambaŭ en 1931) kaj „Sekretaj Sonetoj“ (1932). Per ĉio ĉi mi deziras atentigi, ke oni faras konsiderindan eraron atribuant al la jaro 1921 rolon de limigilo inter la unua kaj dua periodoj de la Esperanta belliteraturo. La frutempa riverenco al la postaj meritoj de K. Kaloczay estas minimume ignoro de la komenca kvarjara periodo (1917—1921) de Esperanto-poezio en Soveta Unio.

La nova eldono de la Poezia Esperanto-Antologio estas reprezenta verko kun ekskluziva valoro. En la sekvaj dek jaroj ĝi estos la granda novaĵo de la tago. La verko sendube estas altvalora, sed ĉu ĝi atingos la amasan leganton? Tiu demando interesas multajn ŝatantojn de poezio, inkluzive la kompilinton, kiu jam en 1958 esprimis la bondeziron, ke ĉiu esperantisto devas koni la E-poetojn kaj ties verkojn. Tio ne okazis, ĉar la unua eldono de tiu verko aperis en 2600 ekz., tamen la nombro de aktivaj esperantistoj tiam estis 6000 kaj la nombro de la organizitaj esperantistoj en UEA — 20 000.

Estas malfacile prognozi kiel nun statas tiu problemo, ĉar oni prisilentas la eldonkvanton. Kvankam presita en Ĉinio, lando kun malalta kosto de la preslaboroj, la prezo de la libro estas alta. UEA devas pripensi la problemon pri vastigo de la jubileaj eldonoj.

La kompilinto iufoje permesis al si fari korektojn en verkoj eĉ de konataj aŭtoroj. La poemo „Sur unu Kordo“, de A. Grabovski ekzistas en du variantoj (1. Lingvo Internacia, IX, 8 (104), aŭg. 1904, p. 227—228; 2. El Parnaso de Popoloj, Varsovio, 1913, p. 10—12). La dua verso de la unua strofo en la eldono de 1904 sonas: „ne ebla sona rim“, kaj jen“ kaj tiu en varianto de 1913: „ne ebla rima son“ kaj jen“. Ambaŭ variantoj estas zefire fluaj: el ortografia vidpunkto devis esti streketo post „ebla“ por videble marki, ke la verbon „estas“ oni ellasis. La kompilinto elektas la duan varianton kaj transformas la adjektivojn „ebla“ en verbon „eblas“. Gramatike tio ŝajnas korekta, sed tiu aldonita „s“ estas kvazaŭ bremsilo, kiu rompas la zefiran flugadon de la verso: „ne eblas rima son“, kaj jen“.

A. Grabovski reviziis la tekston de la poemo „Sur unu Kordo“ (1904), farante en ĝi du ŝanĝojn. La dua verso de la antaŭlasta strofo: „ĝi fulmotondre bruu tuj! fariĝis „ĝi muĝu, fulmu, tondru tuj!“ La plibonigo estas tuj rimarkebla. Bedaŭrinde, ne tiel statas la afero kun la alia ŝanĝo en la teksto. Temas pri la verso dua en la dua strofo. Pli supre estas cititaj ambaŭ variantoj. La unua varianto de 1904 estas pli taŭga ol la plibonigita en la jaro 1913. En la teksto de unua kaj dua strofoj (1904) temas pri „ia“ rim: „sona rim“ kaj „Ornama rim“. Dank’ al tiu analoga esprimo la du strofoj posedas krom belsonecon, ankaŭ logikan ligitatecon kaj tio des pli bone influas la ĝeneralan perfektecon de la poemo.

En la teksto de la dua varianto (1913) la dua verso en la unua strofo estas egalvalora al la koncerna verso de 1904, sed tio ne sufiĉas. La afero fariĝas klara, kiam oni komparas la strofon unuan kun la strofo dua (ambaŭ el la teksto de 1913). En la strofo unua oni parolas pri „rima son“ kaj en la strofo dua — pri „ornama rim“, do la analogeco ĉi tie estas rompita. En la unua kazo oni parolas pri „io“ rima aŭ pli precize pri „rima son“ kaj en la dua kazo temas pri „ia“ rim“ t. e. pri „ornama rim“. Evidente A. Grabovski tiam koncentrigis en la rima problemo, ke li forgesis pri la logika ligitateco inter la du strofoj. La analogaj esprimoj „sona rim“ kaj „ornama rim“ es-

tis substituitaj per pseŭdoanalogaĵoj esprimoj „rima son“ kaj „ornama rim“, tiel la aŭtoro mem, eble en rapideco, ŝiris la fadenon de la logiko. Dezirinde estas, ke en iu estonta eldono la dua verso en la unua strofo de la poemo „Sur unu Kordo“ estu restarigita laŭ la teksto (1904): „ne ebla — sona rim“, kaj jen“. Eble mi tro parolis pri tiu poemo, kiu ŝajnas „gramatika“, teoria (pri versfarado en Esperanto), pri esprimpovo de Esperanto, sed la granda A. Grabovski faris el ĝi sloganon por pli bela estonteeco por la homaro, prunteprenante por la kvara verso de antaŭlasta strofo la komencon „Al-lons, enfants de la patrie“ el la fame konata franca revolucia kanto kaj nacia himno de Francio — „La Marseillaise“. Per tio A. Grabovski memorigas pri la jaroj de la Granda Franca Revolucio 1789—1793. Nur tri monatojn post la aperigo de tiu poemo en Rusio eksplodis trijara kontraŭimperiisma revolucio (1905—1907).

La „Anonimulo“ en la Antologio eble estas E. V. Radvan-Ripinski, esperantisto ekde la komenco de Esperanto, longjara estrarano en la komitato de Societo „Espero“, Peterburgo. Li verkadis poemojn kaj artikolojn pri historio de la Esperanto-movado en Rusio.

Al la kolosa trio — Zamenhof, Grabovski, Devjatnin oni devas aldoni la kvaran koloson — A. Kofman. Li aperigis multajn poemojn libere ne eldonitajn. Devjatnin kaj Kofman devus havi ne po du, sed po tri poemojn en la Antologio. Se en la Antologio oni povus legi la poemon „Kon-siloj“ de Amiko (pseŭdonimo de A. Kofman), presita en „Lingvo Internacia“, IX, 1 (97), jan. 1904, p. 16 la legantaro havus pli realan bildon pri la spirita vivo de tiu poeto, kiu trovis manieron publike konfesi sian progreseman kredon de verkisto kaj sociaganto (en la menciita poemo).

En la unua eldono de la Poezia Antologio (1958) Bulgario estis reprezentita nur per unu poeto — Asen Grigorov. En la nuna eldono estas prezentitaj ankoraŭ tri poetoj: Hristo Gorov, Violin

Oljanov kaj Iv. St. Georgiev. Por la bulgara esperantista movado tio estas ĝojiga fakto. Tamen kun doloro en la koro ĉiu bulgara esperantisto sin demandas, kial mankas inter la poetoj Dimitro Zlatarski (Miti, D. Fajro, D. Foyer, D. Nigra k. a.). Lia poemo „Printempa Rivero“, estus vera ornamo por la Antologio (Bulgara Esperantisto, XX, 1—2, jan.-febr. 1941, p. 10—11). La samon oni povus diri ankaŭ pri liaj poemoj „Fajregoj“, „Lupoj“, „Nigra Maro“ k. a.

Multaj poetoj vivis kaj verkis dum du periodoj, sed ordinare ili estas prezentitaj per poemoj el sia komenca periodo. El la eksterlandaj poetoj estas ellasita la poeto Dao Anh Kha el Vjetnamio.

Devjatnin fariĝis esperantisto ne en 1892, sed unu jaron pli frue. Tion dokumente pruvigas la leteroj de L. L. Zamenhof de 1891, kies teksto estas presita en „La Nova Epoko“, n-ro 75, dec. 1929, p. 73, kaj antaŭ nelonge estis respektitaj en „Zamenhof. Leteroj“, de Adolf Holzhaus, Helsinki 1975, p. 26—28.

En certa grado la brulanta problemo de nia epoko — pri defendo de la monda paco, estas tuŝita en la poezio de Rejna de Jong („Infana jes; Infana raso“), sed mi vane serĉis en la Antologio la pacpoemojn de W. Auld, J. Baghy, K. Kaloczay, A. Grigorov, Hr. Gorov.

Mi bondeziras sukcesan disvastigon de tiu ĉi verko inter la esperantistoj el ĉiuj landoj. Ke ĝi elĉerpigu nur tiam, kiam jam aperis anonco, ke estas presota nova, plurvoluma eldono kun elektitaj verkoj de la Esperanto-poetoj!

CANKO MURGIN

*ESPERANTA ANTOLOGIO, poemoj 1887—1981. Eld. UEA, Jubilea kolekto „Jarcento de Esperanto“, n-ro 1, 1984, p. 888, form. 22×15 cm. Prezo 60 gld.

BATALANTO KONTRAŬ OBSKURANTISMO KAJ FAŜISMO



„Esperanto estas potenca rimedo por kreo de pli fortaj, pli solidaj ligoj inter la popoloj.

ASEN ZLATAROV

„Mi estis tre okupata dum mia vivo por havi tempon zorgi pri miaj intereso, pri mia sano, pri mia vanteco. Tial la plago trafis min neatendite, kiel soldaton sur la posteno: mian lastan lektion antaŭ studentoj mi finis en stato de ekstrema elĉerpigo kaj doloroj. Ili certe ne rimarkis tion kaj adiaŭis min per aplaŭdoj.

Vere, mi havis antaŭsenton, ke min minacas io malbona, sed... — skribas Asen Zlatarov en sia lasta letero, en Vieno, la 6-an de decembro 1936, du semajnojn antaŭ sia morto.

Tio estas la fino de tre enhavoriĉa kaj soci-utila vivo — la vivo de la rimarkinda bulgario prof. Asen Zlatarov — eminenta sciencisto, universitata profesoro, brila oratoro kaj populariganto de la scienco.

Efektive, li estis treege okupata dum sia vivo — dum trideko da jaroj li legis pli ol 600 publikajn referaĵojn en la ĉefurbo kaj tra tuta Bulgario, verkis kaj eldonis pli ol 7000 prespaĝojn — sciencaj verkoj, belestro kaj publicistiko. Liaj referaĵoj, artikoloj kaj sciencaj studoj ludis grandegan rolon por starigo de la bulgara kulturo dum la 30-aj jaroj de nia jarcento.

Prof. Asen Zlatarov naskiĝis la 4-an de februaro 1885 en urbo Haskovo, en patriota familio, kies membroj aktive partoprenas la naciliberigajn batalojn de la bulgara popolo.

Fininte gimnazion en Plovdiv kaj Sofio, li studas kemion en la Sofia Universitato kaj en Genevo (Svislando). En Ĉenevo la juna Zlatarov aŭskultas la flamajn paroladojn de la eminenta aganto de la internacia socialisma movado, batalanto kontraŭ militarismo kaj milito Jean Jaurès, sub lia influo li estiĝas adepto de la socialismaj ideoj. Li vizitas ankaŭ lekciojn pri literaturo, filozofio, politika ekonomiko, ekposedas la marksisman sciencan mondkoncepton. Post multaj jaroj, jam profesoro, li deklaras antaŭ siaj studentoj: „La marksismo, junaj geamikoj, devas esti la solida apogo en via praktiko. Ĝi gvidos vin tra elprovoj kaj bataloj laŭ la vojo al la liberigo...“

Prof. Asen Zlatarov estas granda sciencisto, kun vastaj intereso kaj profundaj konoj en la sfero de natursciencoj. Li faris originalajn esplorojn super vico da problemoj en la scienco pri nutrado — bromatologio, enzimologio, fitobiokemio, stimulado de la semotaj grenoj, per kio li estiĝas pioniro de la scienco pri nutrado en Bulgario. „Bulgario malsatas — jen estas la vero!... — skribas li en 1932. — Tiuj, kiuj devas pensi, pensu pri la prezentitaj donitaĵoj, ili estas objektivaj, ĉar tio estas la lingvo de ciferoj!“

Preskaŭ enciklopediisto de sia epoko, prof. Zlatarov posedas kolosan teoriar informitecon je eŭropa nivelo, riĉajn konojn pri plej diversaj problemoj de la ideologio, scienco, arto, empiriaj esploroj, politiko. Per admirinda majstreco li verkas kaj parolas pri la genio de Botev, pri la eposo de Vazov, pri la liriko de Javorov kaj Liliev, pri la ekzalteca radiado de Tagore, pri la ĉarma beleco de la Melosa Venuso, pri la revolucioj en scienco faritaj de Darvino kaj Markso — serio da emociaj, aktualaj publicistaj, sciencaj kaj kulturaj problemoj ekvivas en populara, alirebla formo en liaj referaĵoj kaj artikoloj, transformiĝas en popolan universitaton, en kiu regas la nobla penso, la revolucia subteksto, la morala kuraĝo de prof. Zlatarov.

Unu el liaj altaĵoj estas lia parolado pri Anton Straŝimirov en 1931, en kiu li malkaŝe submetas al publika malhonorigo la murdistojn de la Septembra Ribelo 1923, donante merititan rekonon al la verkisto, kiu havis la kuraĝon prezenti en sia romano „Rondodanco“ la popolan tragedion: „Kaj tiam, en tiu terura tumulto... sin aŭdigis Anton Straŝimirov, sola meze de la silento de senkuraĝo-

loj, kaj diris vortojn de doloro kaj humaneco. Li starigis kiel konscienco . . . Tio estas la plej granda, plej sublima momento en lia vivo.“

Zlatarov estas poeto ne nur en siaj lirikaj verkoj „En la urbo de amo“, „Floroj por li“, „Kanto pri ŝi“ — la belaj poeziplenaj vortoj donas estetikajn ĉarmon al ĉiu lia penso de sciencisto kaj civitano.

Li estas poeto ankaŭ en sia malamo al la faŝismo, reakcio kaj subpremado, al ĉiu tiraneco. Kun ĝojo kaj espero li renkontas la venkon de la Granda Oktobra Revolucio en 1917. Kvankam lia humaneco estas tre delikata por akcepti la logikon de perforto de homo super homo, eĉ kiam tion postulas la defendo de plej altaj interesoj de la revolucio, li komprenas ĝian majestecon kaj estiĝas amiko kaj defendanto de la unua socialisma lando kontraŭ la kalumnioj de la burĝaro.

Kiel elstara propagandisto, Zlatarov havas grandan deziron vidi per siaj propraj okuloj tion, kio okazas en Sovet-Unio. Tio estiĝas ebla en 1935. Kiam li, kiel delegito de la XV Internacia Kongreso pri Fiziologio, vizitas la sovetan landon en aŭgusto 1935. En Sovet-Unio prof. Zlatarov vizitas uzinojn, lernejojn, serĉas kontaktojn kun la junularo, kun ordinaj laborhomoj. Li revenas Bulgarion entuziasmigita, flugilhava.

En la sekvaj semajnoj kaj monatoj lia nomo tre ofte aperas sur la paĝoj de la bulgara progresema gazeto.

Nur en kelkaj monatoj Zlatarov sukcesas sintezi kaj ordigi siajn impresojn kaj en majo 1936, en eldonkvanto de 20 000 ekzempleroj aperas lia 230-paĝa libro „En la lando de Sovetoj“, kompletigita per 57 kliŝoj, ilustrantaj lian rakonton pri ĉio vidita. Ĝi elĉerpiĝas tuj, la intereso al ĝi estas grandega.

En la antaŭmorta letero-testamento de prof. Zlatarov oni legas: „Kaj kiam en Soveta Rusio mi vidis, ke estiĝas realaĵo tiu homaro, pri kiu mi revis jam antaŭ 30 jaroj, ke naskiĝas nova civilizacio, nova sociordo, ke la homo havas senliman kampon por evoluigo de siaj fortoj, por supreniro kaj fardo, — mi ploris pro admiro. Blindaj estas, kiuj ne vidas tion! Nur ne estu milito!“

„Nur ne estu milito!“ — tio ne estas nura frazo. Por ke estu plena la bildo pri la sociutila agado de prof. Zlatarov, oni ne devas preterlasi ankaŭ la fakton, ke en la 20–30-aj jaroj li okupas honoran lokon en la batalo de la progresemaj fortoj en Bulgario por defendo de la paco. Edukita en la spirito de la demokratiaj tradicioj de nia renesanca epoko, penetrita de la humanaj ideoj de multaj progresemaj reprezentantoj de la eŭropa civilizo, mem spertinte la teruraĵojn de la milito (kiel sanitara voluntulo dum la Balkana Milito en 1912), per sia partopreno en alvokoj, peticioj kaj per siaj referaĵoj li manifestas sian aktivan pozicion kontraŭ la milito, militarismo kaj rasismo. Tre elokventa tiurilate estas lia broŝuro „La kemia milito kaj la pezo de la homaro“, aperinta en 1929.

„Plej valora trajto de Zlatarov estis lia resonemo al la sociaj problemoj . . . Li ne estis blinda pri la sociaj bataloj“ — skribas pri li Georgi Bakalov, severa juĝanto de la sociaj kaj kulturaj aperaĵoj en tiama Bulgario.

Asen Zlatarov aperas sur la historia areno kiel batalanto kontraŭ la reakcio kaj faŝismo, kiel defendanto de la socia justeco kaj homa digno. Kaj liaj armiloj en tiu batalo ĉiam estis la vero kaj humaneco.

LIDIA RAEVA

ALTA DISTINGO POR KRĀSTJU KARUCIN

Lige kun la 70-jariĝo kaj la distingo per ordeno „Popola Respubliko Bulgario“ — unua grado, de la sindona multjara E-aktivulo kaj kontraŭfaŝisto Krāstju Karucin, nia unua partia kaj ŝtata gvidanto Todor Jivkov sendis al li gratulleteron.

La redakcio de „Bulgara Esperantisto“ kore gratulas nian estimatan kolegon kaj aktivan redakcianon pro la alta ŝtata distingo kaj bondeziras al li multajn fortojn por daŭrigi sian aktivan laboron por plua prospero de la bulgara E-movado.

Al Krāstju Dimitrov Petrov (Karucin)
Bul. „Fr. Botev“ 102
Sofio

Kamarado Karucin,

Akceptu miajn plej korajn salutojn okaze de Via distingo per ordeno „Popola Respubliko Bulgario“ — unua grado, kaj Via 70-a naskiĝtago.

La alta distingo estas merita honoro por Vi — la aktiva batalanto kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo, pasinta tra la vicoj de RMS, suferinta en malliberejoj kaj koncentrejoj, fordoninta siajn fortojn kaj kapablojn por konstruado de la socialismo, por la prospero de nia kara patrujo.

Per Via abnegacia socia agado Vi kontribuas por prospero de la Esperantista Asocio en nia lando. Mi bondeziras al Vi sanon, feliĉon kaj sukcesojn.

Gratulojn:

La 15-an de februaro 1985

T. JIVKOV

LA PLEJ FORTA ARMILO

Tiun ĉi artikolon sendis al ni Ivan Ivanoviĉ Skakunov el Kievo, USSR, 84-jara, veterano de la Dua Mondmilito, eksaĉefserĝento el la Soveta Armeo. Dum la milito li trairis kun sia milititaĉmento la gloran batalvojon de Stalingrado ĝis Prago (en aŭgusto 1945).

Lige kun la 40-jariĝo de la venko super faŝista Germanio, kiun celebras dum la kuranta jaro la tuta progresema homaro, ni publikigas la rememorojn de I. Skakunov.

Estis la suna printempo de 1945. Daŭris sangverŝaj bataloj de la Soveta Armeo kontraŭ la germanaj faŝistaj hordoj sur ilia propra teritorio. Jam neniu dubis pri la pereco de faŝista Germanio, sed la hitleranoj furioze sin defendis kaj penis savi ĉiun peceton de la tero, kiu bruladis sub iliaj piedoj. La propagando de Goebbels plifortigis sian furiozan kriadon, promesante al siaj defendantoj proksiman uzadon de nova, plej terura armilo, kiu povas rapide frakasi la malamikon. Kaj la germana junularo kredis la propagandon, precipe tiuj junuloj, kiuj fariĝis oficiroj, atendis la promesitan teruran armilon kiel manaon.

Kaj jen tia momento kvazaŭ estus alvenonta, kiam la „faustpatronoj“ (reakcia armilo), antaŭe agintaj kontraŭ sovetaĵ tankoj je distanco de 20—30 metroj, efektivigis unuan, duan, trian... potencajn salvajn pafadojn al niaj pozicioj je distanco de 200 metroj. Fajraj kirloventoj aperis en la lokoj de falintaj obusoj, la tero tremis, sed la pafado estis necelita kaj kaŭzis nenian domaĝon al sovetaĵ milittrupoj, kiuj bone plifortikigis siajn poziciojn. Ĉe tia situacio, niaj militesploristoj laŭ konataj nur al ili vojetoj trafenetris la defendlinion de la malamiko kaj kaptis grandan grupon da faŝistaj oficiroj.

La sekvanta post la uragana alflugo de faŝistaj „faustpatronoj“ tago estis serena, varma kaj trankvila. Tiun tagon mi kun mia grupo de soldatoj-komunistoj deĵoris ĉe la korpusstabo. Tra la korto de la domo, kie ĝi situis, eskortata de sovetaĵ soldatoj, iris la militkaptita grupo da germanaj oficiroj. Ili estis tre junaj, kun faŝistaj SS-emblemoj sur iliaj uniformoj. Nur unu el ili estis maturaĝa, ĉirkaŭ 45-jara. En la militesplora fako de la korpusstabo oni longe esplordemandis ilin.

Dum mallonga paŭzo unu el niaj staboficiroj aliris la plej aĝan militkaptiton kaj alparolis lin en germana lingvo:

— Mi ĉeestis ĉe viaj esplordemandadoj kaj aŭskultis ĉiujn respondojn de la militkaptitoj. Viaj personaj respondoj kontrastas kun la respondoj de viaj kolegoj. Ili parolis, ke la Soveta Armeo, kvankam ĝi troviĝas ĉe la muroj de Berlino, baldaŭ denove estos revenigita al Stalingrado. Goebbels promesas novan teruran armilon, kiu ebligos tion. Sed vi

persone diris, ke la milito por vi ĉiuj estas malgajnita. Vane via komandantaro, — vi diris, — kontraŭbatalas, vane plu verŝigas homa sango, ĉar estas evidenta la venko de la Soveta Armeo. Mi dezirus scii, per kio vi povas klarigi la venkojn de nia armeo?

— Mi ne estas profesia oficiro. Mi estis civila inĝeniero. Al mi ŝajnas, ke nia komandantaro subtaksis la grandajn vastaĵojn de via lando, kalkulante je „blitzkrieg“ (fulmrapida milito) — respondis la militkaptita oficiro.

— Tio estas vera — jesis la soveta oficiro. — Kaj ankoraŭ?

— Ankoraŭ, — nepalpebruminte respondis la germana oficiro, — ankoraŭ nin definitive finbatis teruraj frostegoj, viaj bonaj helpantoj kaj niaj mortigaj malamikoj.

— Kaj ankoraŭ?

La militkaptita germana oficiro levis la ŝultrojn. Li estis embarasita kaj nenion respondis.

Tiam nia oficiro diris:

— Ni, komunistoj, kaj nia tuta soveta popolo, en ĉiu afero penas trovi la ĉefan, decidigan kaŭzon de l'rezulto. Ĉio, kion vi diris, estas vero. Verdire tiuj kialoj estas tre gravaj faktoroj por niaj venkoj. Sed unu el ili estas la ĉefa, la decidiga, sen kiu ne estus ebla nia venko. Jen pri tiu kaŭzo mi volus aŭdi vian opinion.

La militkaptita germana oficiro peze sopirĝemis kaj respondis mallonge:

— Tuta nia malfeliĉo konsistas en tio, ke ĉiu via soldato estas politikisto.

Nia oficiro rapide ekkaptis la dekstran manon de la germana oficiro per siaj ambaŭ manoj kaj skuis ĝin. Poste li turnis sin al ni kaj laŭte, ruslingve, diris:

— El la buŝo de nia malamiko mi ekaŭdis la leninisman determinon, kvankam per aliaj vortoj, pri la ĉefa, la decidiga kaŭzo de nia venko super la kruela kaj malica malamiko. Jes, ĉiu nia soveta soldato efektive estas politikisto, profunde konscienca homo, kiun nenio forto en la mondo povas superforti. Lenin diris, ke la ŝtato estas forta per la konscienco de la popolo.

Poste li detale rakontis al ni pri sia interparolo kun la militkaptita germana oficiro, kiu staris kaj ridetis, balancante aserte la kapon, kvazaŭ efektive komprenante la rakonton de nia oficiro.

IVAN SKAKUNOV,
Kievo, USSR



ESPERANTO-TURISMO POR NEESPERANTISTOJ

Antaŭ pluraj jardekoj, kiam la homoj komencis senti la praktikan valoron de Esperanto, inter la esperantistoj naskiĝis nova kutimo: la individua turismo. Ili havis korespondamikojn en diversaj lokoj tra la mondo, kaj pere de siaj geamikoj ili komencis vojaĝi eksterlanden. Tie oni gastigis ilin, donis tranokton, manĝon — do ĉion, kio estis bezonata — kontraŭ reciproka gastigo. La vojaĝantoj poste invitis la gastigantojn al siaj hejmoj, promesante al ili similajn kondiĉojn. Tio estis bona kaj sufiĉe malmultekosta maniero por eksterlanda vojaĝo, ĉar, kompreneble, hejme ĉio estas malpli kosta, ol en eksterlando.

La lastatempa krizo en la tuta mondo ĉiam plimalfaciligas ankaŭ tiaspecajn vojaĝojn. Krome, nuntempe vojaĝas sammaniere ankaŭ tiuj esperantistoj, kiuj en la lando, al kiu ili intencas iri, tute ne havas amikojn aŭ konatojn. Ili simple prenas la Jarlibron de UEA, elserĉas kelkajn adresojn, skribas al tute nekonataj homoj kaj petas helpojn dum sia restado en la koncerna lando. Kompreneble, ankaŭ tiaj kontaktoj povas esti rezultodonaj. Tamen, fremdaj homoj — kvankam ili estas esperantistoj — ne ĉiam staras volonte je dispono de fremdlanda vagabonda esperantisto.

Alia tereno de la individua turismo estas la partopreno en diversaj Esperanto-aranĝoj. La homoj elektas kongreson aŭ seminarion, skribas al la organiza komitato, petas informojn kaj skribas, ke ili pagos ĉion post la alveno, surloke. Se ni sincere traktas la aferon, ni povas diri, ke 75% de tiaj aliĝantoj estas seriozaj personoj, ili akurate alvenas kaj pagas surloke. Tamen, ĉiam restas tiuj aliaj 25% de la aliĝantoj, kiuj aŭ tute ne alvenas — sen iu ajn informo — aŭ ili ja alvenas kaj klarigas, ke ili havas pagmalfacilaĵojn, ne pro sia malseriozezo, sed pro sialandaj fremdvalutaj reguloj. Sed la organiza komitato de la koncerna Esperanto-aranĝo devas ankaŭ por tiuj 25% antaŭmendi kaj ofte antaŭpagi la tranoktadon kaj manĝadon. Tial la foresto de tiuj 25% povas kaŭzi al la aranĝantoj grandajn financajn malfacilaĵojn, kelkfoje eĉ tute grandan deficiton.

Pro la amaso de vojaĝantaj esperantistoj kelkaj vojaĝoficejoj komencis interesiĝi pri Esperanto, kiel helplingvo en la turismo. Antaŭ dek jaroj el Pollando venis la unua pli nova iniciato uzi Esperanton kiel oficialan lingvon en la turismo. La vojaĝoficejo „Ju-

ventur“ el la urbo Bydgoszcz komencis sendi grupojn al diversaj Esperanto-aranĝoj en Hungario, Bulgario kaj Ĉeĥoslovakio, kun Esperantaj gvidantoj. Dum tiu 10-jara periodo „Juventur“ evoluis al la nun funkcia vojaĝagentejo „Esperantotur“ en Bydgoszcz, kiu — ni povas diri — estas la unua el la nunaj turismaj agentejoj kun Esperanto kiel oficiala lingvo. Preskaŭ samtempe, similajn klopodojn oni faris ankaŭ en Bulgario, kie tiam estis fondita Internacia Esperanto-Kursejo, nun funkcia en la urboj Smoljan kaj Varna. En tiu kazo, tamen, ne temis nur pri turismo, sed ankaŭ pri instruado de Esperanto dum la koncernaj turismaj aranĝoj.

Sed tio tamen estis nur la komenco. Antaŭ kelkaj jaroj fondiĝis ankaŭ la vojaĝoficejo „Suno kaj Maro“ en Milano (Italio), Esperanta FERIA Asocio en Ipswich (Britio), vojaĝoficejo de ELNA (Usono), kaj multaj aliaj societoj kaj asocioj komencis interesiĝi pri Esperanto-turismo.

La vojaĝoficejo „Rekrea“ en Prago (Ĉeĥoslovakio) faris fine de 1981 interkonsenton kun Ĉeĥa Esperanto-Asocio por sendi kaj akcepti Esperanto-grupojn. Antaŭ unu jaro ankaŭ en Hungario okazis simila paŝo: estis fondita Esperanto-Sekcio de la vojaĝoficejo „Express“ en Budapeŝto. Tiu sekcio havas kontaktojn eksterlande kun diversaj vojaĝagentejoj, kiuj utiligas Esperanton, kaj enlande ĝi (kune kun la Turisma Komisiono de Hungara Esperanto-Asocio) kunlaboras pri Esperanto-turismo kun la turismaj aktivuloj de la teritoriaj komitatoj de HEA. Esperanto-Sekcio de „Express“ akceptas eksterlandajn Esperanto-grupojn en Hungario, kaj sendas Esperanto-grupojn eksterlanden. La grupoj ĉiam havas Esperantan gvidanton, ankaŭ kiam ili konsistas nur el esperantistoj.

Tamen, ni denove devas insisti pri la diferenco inter la esperantista turismo kaj Esperanto-turismo. Se iu vojaĝoficejo sendas grupon konsistantan nur el esperantistoj, tio estas esperantista turismo. Sed, se ĝi sendas grupon neesperantistan kun Esperanta vojaĝgvidanto — kaj se ankaŭ la gvidanto ĉe la akceptanta flanko estas esperantisto — tiam temas pri Esperanto-turismo.

Multaj esperantistoj grumblas, se en iu aranĝo aperas grupo, en kiu nur la gvidanto parolas Esperanton, kaj la aliaj komprenas nenion. Pro kio tia grupo venis partopreni Esperanto-aranĝon? La respondo estas tre fa-

cila: ni devas malfermi la pordojn!

Se la esperantistoj ĉiam renkontas nur unu la alian, se kontaktoj okazas nur interne de la esperantista rondo, tio povas esti tre agrabla, sed tio tamen ne estas propagando de Esperanto kaj ĝiaj praktikaj valoroj al la eksteruloj. Se la homoj, la neesperantistoj, sentas la etoson de iu Esperanto-kunveno, kaj suferas pro tio, ke ili nur pere de sia gvidanto povas interkompreniĝi kun alilandanoj, ĉe ili certe vekigos la intereso pri Esperanto. Guinte, eĉ nur parte, la agrablan atmosferon de bone organizita aranĝo, tiuj eksteruloj sopiros reveni, kaj ili scios, ke oni nur pere de Esperanto povas sperti ion similan.

Ni do ne grumblu kontraŭ la neesperantistoj en la Esperanto-aranĝoj, ĉar ankaŭ ni ĉiuj iam estis en ilia situacio. Ni lernu ne nur „toleri“ ilin, sed ni ankaŭ uzu la okazon por informi ilin pri Esperanto kaj ni helpu al ili sperti la praktikajn valorojn de la Internacia Lingvo. Ni tiel plej efike helpas la disvastigon de Esperanto en la turisma medio. Kiam ni mem vojaĝas eksterlanden, ni provu utiligi la servojn de tiuj kelkaj vojaĝagentejoj, kiuj kuraĝis vicigi Esperanton inter la lingvoj, en kiuj ili prizorgas sian internacian turisman agadon.

MARGIT EVVA, gvidanto de E-sekcio ĉe vojaĝoficejo „Express“ — Hungario

KIO ESTAS KOMPUTILO?

Speciale por la legantoj de „Bulgara Esperantisto“ niaj kolegoj el revuo „Internacia Komputado“ sendis al ni du interesajn materialojn: „Kio estas komputilo“ kaj „Kion oni povas fari per komputiloj“. La aŭtorino Ilona Koutny — lingva revizianto kaj teknika redaktoro de la revuo — populare prezentas aktualajn kaj necesajn por la nuntempa homo problemojn.

La okazinta en februaro j. k. plenkunsido de CK de la Bulgara Komunista Partio akcentis la demandon „Pri iuj novaj konceptoj kaj metodoj en prilaborado kaj efektivigo de la scienc-teknika politiko de Popola Respubliko Bulgario“.

Lige kun tio, estimataj legantoj, ni proponas al via atento la unuan el la ĉi-supre menciitaj artikoloj. En iu el la sekvontaj numeroj vi legos ankaŭ la alian.

La komputilo manipulas diversajn, informajn, tielnomatajn datumojn, ĝi eniras, eligas ilin, intertempe ĝi storas (gardas), prilaboras ilin, do transformas ilin.

La datumoj eniras en formo de ciferoj. La plej malgranda unuo de informo estas la **bito**, kiu povas havi du statojn: jes aŭ ne; per ciferoj 1 aŭ 0. Ĉiujn nombrojn kaj literojn kaj kelkajn aliajn simbolojn oni povas prezenti en serio de bitoj;

ekz. 136: 10001000

Ok bitoj formas unu **bajton**. Kiam ni parolas pri la „grandeco“, kapablo de iu komputilo, ni indikas, kiom da kilobajtoj (kbajt) ĝi havas en si.

Se ni laboras per mikrokomputilo, ni povas enigi la datumojn per la **klavaro**. La komputilo tuj prilaboras la informojn kaj donas la respondon sur la **vidigilo** (kiu povas esti simpla televidilo). Tiel ni laboras **interaktive**.

Por prilabori la datumojn ne sufiĉas **aparataro**, necesas ankaŭ ilo por funkciigi ilin; tio estas la **programaro**. Ekzistas bazaj programoj, ĝenerale venditaj kun la maŝino, kiuj estas kapablaj funkciigi la aparatojn — t. e. la **funkciiga sistemo** (aŭ operacia sistemo). La **uzantoj** mem povas fari programojn por solvi siajn problemojn. La **programo** estas serio de paŝoj — antaŭe fiksitaj kaj kompreneblaj de la komputilo — kiuj kondukas al la solvo de la tasko. La programojn oni devas skribi laŭ certaj reguloj, en t. n. **programlingvo**. La plej populara programlingvo ĉe mikrokomputiloj estas BASIC.

KOUTNY ILONA

Revuo „Internacia Komputado“

Ekde la komenco de 1984 la nomaro de E-periodaĵoj pliriĉiĝis per nova titolo — „**Internacia Komputado**“! Eleganta, belaspekta 64-paĝa revuo, interesa legaĵo ne nur por komputistoj, sed por ĉiu moderna homo, kiu uzas aŭ intencas uzi komputilojn.

„**Internacia Komputado**“ havas facilan lingvaĵon, ĉar ĝi kalkulas ankaŭ al legantoj kun ne tre alta lingvoscio.

„**Internacia Komputado**“ proponas precizan priskribon de novaj produktoj, teknikajn karakterizaĵojn, adresojn, prezojn kaj aliajn similajn informojn utilajn al aĉetemuloj aŭ posedantoj de mikrokomputiloj.

Ĉiu leganto havas la eblecon prezenti sur la paĝoj de „**Internacia Komputado**“ la atingojn de mikroelektroniko ankaŭ en sia lando.

En la dua duono de 1985 la revuo akceptos publikigendajn materialojn pri temoj; **Cibernetiko** (ĝis 30. 9. 85) kaj **Mikroelektroniko** (ĝis 30. 11. 85).

„**Internacia Komputado**“ havas perantojn en pli ol 30 landoj de Afriko, Ameriko, Aŭstralio, Azio kaj Eŭropo.

Peranto por Bulgario: Todor Dimitrov, BG-5000, Veliko Tŕrnovo, N. Pikolo 11, tel. 22-347 (hejma) kaj 2651/227 (ofica). Jara abonkotizo por 4 kajeroj — 8 levoĵ.

Kion ni japanoj nun devas fari?

Hodiaŭ ni ĝuas la Zamenhof-feston kaj ni ĉiuj eble sentas kontenton aŭ feliĉon kun espero pri estonta feliĉa homa vivo. Tamen ĉu ni povas esti plene feliĉaj? Tute ne, eble ĉiuj senescepte havas iomgrade embarason aŭ maltrankvilon, konscie aŭ subkonscie pri nia reala vivo, ĉu ne? Ekzemple pri nuna kaj estonta ekonomia vivo, aŭ pri neevitebla Tookai-tertreto, aŭ pri eventuala nuklea milito ktp.

Parolante pri Tookai-tertreto, laŭ la sciencista esploro ĝi certe atakos distrikton Tookai kaj najbaran Kantoo, ĉar la energio de la tertremo jaron post jaro akumuligis kaj ĝi jam atingis la limon de streĉo. Do, ĝi tre baldaŭ eksplodos. Tia tertremo regule okazas proksimume en ĉiuj kelkdeko da jaroj, laŭ la neevitebla natura leĝo, kaj jam pasis 70 jaroj depost la lasta okazo, nome Kantoo granda tertremo.

Tamen, geamikoj, hodiaŭ mia parolado ne temas pri la tertremo. Temas pri alia akumuliganta energio, nome akumuligantaj nukleaj armiloj, kiuj jam nun sufiĉas en la tuta mondo por multfoje ekstermi la tutan homaron.

Malgraŭ tio ankoraŭ oni hastas por ne esti venkita en la vetarmado, pretekste ke tio estas necesa por gardi sian sekurecon. Ĝis kiam tia vetarmada vojo daŭros? Ĉu ni devas atendi, same kiel la tertremo, ĝis tiam, kiam tiu akumuliganta energio, nome akumuligantaj nukleaj armiloj, atingos limon kaj eksplodos?

Kiel sekvo, ĉio neniigo — amo, amikeco,

feliĉo kaj ankaŭ Esperanto, ĉio fariĝos vanĵaĵo.

Eble kelkiuj pensus, ke mia opinio estas fikcia aŭ tro pesimisma. Tamen kiam mi vidis sur foto en ĵurnalo nigran kofron, ĉiam akompananta la prezidenton Reagan, ĉe lia lasta vizito al Japanio, mi ne povis ne senti realecon de mia opinio. Laŭ la klarigo en la ĵurnalo tiu nigra kofro enhavas aparaton por ordoni lanĉi nukleamilojn. Vere li estas tiu homo, kiu ĉiam ajn havas ellasilon aŭ ŝlosilon por nuklea milito. Vere realeca aspekto tio estas, ĉu ne? Neniel fikcia!

Do, mi opinias, ke se ni ne povas ĉesigi iam ajn tian frenezan vetarmadon, estas certa la pereco de la homaro, neniigo de ĉio.

Ni devas ŝanĝi la vojon de vetarmado, kaj precipe ni, japanoj, devas ŝanĝi Japanion al la inicianta lando, ne nur en ekonomio aŭ tekniko, sed ankaŭ en malarmado.

Proksimiĝas la ĝenerala balotado, baldaŭ ni povos praktiki en politiko per voĉdono.

Kiel sincera popolano, kiel sincera pacamanito, kaj antaŭ ĉio kiel esperantisto, laŭ via justa juĝo, vi elektu taŭgan vojon, por ke ni povu fariĝi veraj feliĉuloj. Koran dankon!

(El parolado de **Sato Morio** dum la Zamenhofa festo, decembro 1984, en **Toleio**, Japanio. Sendita de nia japana kolego **Takasi Ookara**).

AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCIOJ (AIS) EN SAN-MARINO BALDAŭ EKFUNKCIOS

Laŭ Fakultata Cirkulero №3 de la 22-a de januaro 1985, subskribita de prof. Paul Neergard, la Respubliko de San-Marino rekonis, kiel antaŭvidite, la de fakto-ekziston de AIS — San Marino. Plue, la Ministeriano d-ro Fausto Morganti petis, ke flanke de AIS oni prezentu por aprobo laborplanon kaj buĝeton por 1985 lige kun aprobo de statutpropono kaj leĝigo de la Instituto. Depende de la dato de definitiva oficialigo, la okazigo de la venonta Dua Sesio de AIS estas antaŭvidota por la unua semajno de septembro 1985.

Estos menciite speciale, ke inter kunlaborantaj institucioj Bulgara Akademio de Sciencoj estos inter la unuaj, kiuj jam anoncis sian pretecon oficiale kunlabori kun AIS.

Prof. HRISTO MARINOV,
senatano de AIS



Niaj kolegoj kaj amikoj el Japanio prof. Mizuno Yoŝiaki kaj s-ro Takasi Oohara (kvara kaj sepa dekstre), kiuj vizitis Bulgaron kaj studis Esperanton en IEK — Pisanica

JAPANIO — MALPROKSIMA KAJ PROKSIMA

(Daŭrigo de n-ro 2/85)

Frue matene ni kun fraŭlino Tacuko Muto forveturas al urbo Nagazaki. En la stacidomo en Nagazaki nin bonvenigas sinjoro Ito kaj enloĝigas nin en hotelon. Post tio li konkukas nin al la esperantisto sinjoro Vatanabe en la lernejon, kiel li instruas. Unuafoje mi eniras en japanan lernejon. En la antaŭĉambro ni sensuiĝas kaj surmetas pantoflojn. La konstruaĵo estas malnova, rekonstruita, ĝi travivis la atombombadon je la 9-a de aŭgusto 1945. En la korto modesta monumento el ŝtono memorigas pri la senkulpe pereintaj en tiu tago lernantoj. Muloj da diverskoloraj papergruoj ornamas la monumenton. Sinjoro Vatanabe invitas nin en sian kabineton, kie per televidilo ni spektas la fermon de la Kongreso de Paco, kolektinta senditojn el la tuta mondo. La kongreson oni elsendas rekte el la Parko de la Paco.

Sinjoro Vatanabe estas senlaca ĉiĉerono. Per paŝo de trejnita sportisto li montras al ni iujn el la monumentoj kaj la muzeon de la atombombitoj. Ni vizitas la Pacparkon. En ĝi troviĝas multe da monumentoj, donacitaj de diversaj ŝtatoj. Inter ili troviĝas ankaŭ monumento donacita de malgranda Bulgario. Kun kortuŝo mi ekstaras apud ĝi — unu albulo el mia fora patrujo.

Vespere ni renkontiĝas kun la lokaj esperantistoj, antaŭ kiuj mi parolas pri la Kursejo, pri la bulgara Esperanto-movado por paco. Fine la entuziasmaj junaj esperantistoj, sinjoroj Tojama kaj Morivaki montras al mi kaj al fraŭlino Muto la noktan panoramon de Nagazaki desur la 332 metrojn alta pinto apud la urbo. Diverskoloraj lumoj zefire reflektiĝas en la trankvilaj akvoj de la Japana Maro. La urbo kun pli ol kvarcent kvindek miloj da loĝantoj, situanta sur insulo Kjusju, pitoreske kuŝas meze de nealtaj montetoj.

Kaj jen mi estas denove en Fukuoka. Granda, milionaria havena urbo.

La ĵurnalisto sinjoro Inove, tre bona esperantisto, laboras en la redakcio de unu el la plej grandaj japanaj ĵurnaloj „Niŝi-Nipon-Sinbun“. Li aranĝas por mi en la redakcio renkontiĝon kun la ĉefredaktoro de la gazeto sinjoro Cuneo Takiguĉi. Malgraŭ sia granda okupiteco, sinjoro Takiguĉi akceptas min kaj miajn novajn japanajn amikojn sinjoro Niŝida kaj fraŭlino Muto tre sincere. Li interesiĝas pri multaj aferoj — kiu mi estas, de kie mi venas, kion prezentas por mi Esperanto, ĉu la bulgara Esperanto-movado evoluas, kial mi batalas por paco, kiaj estas miaj impresoj pri Japanio kaj pli speciale pri Hiroŝima kaj Nagazaki. . . Dank' al la bona interpretado de sinjoro Inove, la ĉefredaktoro en mallonga

tempo ricevis rapidan kaj varian informon. La amika konversacio finiĝas kaj sinjoro Takiguĉi persone kaj ĝentile akompanas nin ĝis la lifto kaj varme dankas al ni ĉiuj pro la agrabla renkontiĝo. Mi estas tre kontenta pri tiu vizito, ĉar mi konstatas, ke por japanoj la problemoj por la paco estas vivgrava.

Vespere mi estas ĉefpreleganto pri la paco en organizita kunveno por esperantistoj kaj neesperantistoj el la urbo. Mi rakontas pri la bulgara MEM-agado. Tradukanto estas la entuziasma samideano kaj pacamanto sinjoro Niŝida. Ĉeestas ankaŭ ĵurnalistino el la re-



Faksimilo de intervjuo kun V. Cvetkova en japana gazeto

dakcio de la fama en Japanio gazeto „Mainiĉi“. La intereso al la batalo por paco de la bulgaraj esperantistoj kaj ĝenerale por konservo de la paco en la mondo estas granda. Oni demandas min ĉu la bulgara MEM-Komitato estas subtenata de la ŝtato; ĉu estas kontraŭuloj de la pacmovado en nia lando; ĉu mi iam renkontis atombombitojn kaj tiel plu. Ĉi-vespere mi ekscitiĝas ege. La renkonton ĉeestas ankaŭ kelkaj atomviktimoj en Hiroŝima kaj Nagazaki.

Post la kunveno sinjoro Niŝida afable akompanas min ĝis la hotelo kaj en ekskluzive amika konversacio ni interŝanĝas pensojn pri Esperanto, paco, amikeco inter la popoloj kaj la homoj. Tiu trankvila kaj inteligenta viro ravis min per sia organiza talento. Dank' al li kaj la ceteraj fidelaj esperantistoj el Fukuoka—sinjoro Inove, sinjoro Ito kaj aliaj la renkontiĝoj en tiu urbo pasas je tre alta nivelo. Neniam mi forgesos la momenton de la disigo kun sinjoro Niŝida ĉe la stacidomo. Tra

la fenestro de la superekspreso li rigardas min kun tia varma zorgemo, kvazaŭ li timus ĉu mi atingos sana kaj viva la stacidomon de Osaka. Li ne foriras ĝis la forveturo de la vagonaro. Mi svingas danke per mano.

Ĉe la stacidomo en Osaka min senpacience atendas s-ro Nanba. Ĉi-vespere li preparis por mi grandan surprizon. Mi ĉeestas la emocian renkontiĝon kun esperantistoj el la urbo, kiun partoprenas ankaŭ sinjoro Hideo Fuĝi. En 1936 li tradukis el angla kaj germana lingvoj en japanan la raporton de Georgi Dimitrov antaŭ la Sepa Kongreso de la Komunista Internacio, titolitan „Problemoj pri la taktiko de la Popola Fronto“. Kune kun ĝi tradukis tiun prelegon, sed el Esperanto, lia amiko Jutaka Takaragi, kiu forpasis antaŭ la fino de la milito. Ili vivis en malfacila periodo kaj la rava personeco kaj laboro de Georgi Dimitrov kiel unu el la gvidantoj de la internacia laborista movado kaj heroo de la Leipziger proceso, ege allogis ilin. Ambaŭ tradukintoj komparis la tradukojn por pli bona precizeco kaj elektis la plej konvenan. La prelego estis eldonita nelegale, nur en tricient ekzempleroj, kaj post tio sendita al progresemaj organizaĵoj, al intelektuloj kaj komunistoj. Mi sekvas sen-spire lian rakonton, subtenatan kun aldonoj de la ĉeestantaj ĉi tie fratoj de la mortinta esperantisto-tradukinto Jutaka — sinjoroj Minoru kaj Takenori Takaragi. Sinjoro Hideo Fuĝi montras al mi kun fiero kaj emocio la unikan restintan nedifektitan, sed malnoviĝintan originalon de la prelego de Georgi Dimitrov. Tio estas lia vivo, kiel li konfesas, tio estas parto de lia batalo. Li donacas al mi kopion de tiu libro kaj el tiu kortuŝa gesto mi komprenas, ke li vidas el mia persono parteton de la bulgara popolo, naskinta tian grandan filon, la faman internaciiston Georgi Dimitrov. Kune kun la kopio de tiu prelego

mi ricevas ankaŭ aliajn librojn pri la japana laborista movado antaŭa kaj nuna, pri pacbatalo. Ĉiujn tiujn valorajn materialojn pli poste mi transdonis al la Nacia Muzeo „Georgi Dimitrov“ en Sofio, opiniante, ke tie ili trovos sian plej indan lokon.

La dekduan de aŭgusto kune kun Syózi mi alvenas en la urbeton Vani ĉe la lago Biva — la plej granda en Japanio. Ĉi tie troviĝas Friska Lernejo aŭ tiel nomataj kvartagaj ekspresaj Esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresintoj (11—14.VIII.1984). La kursanoj estas diversaj — infanoj, junuloj, plenaĝuloj — ĉiuj tirataj de deziro eklerni la Internacian Lingvon kaj perfektigi siajn konojn.

La organizantoj zorgis, ke la kursanoj paralele kun la lernokupoj havu ankaŭ distrojn — bazaron de interesaj Esperanto-libroj, klerigajn lekciojn, interkonan kaj gajan versperon, renkontojn kaj konversaciojn kun eksterlandanoj kaj tiel plu. La vesperaj lekcioj, kiujn mi ĉeestas, estas interesaj. Unu el ili estas, kiamaniere la japanoj lernu la internacian lingvon, kaj la alia estas pri la vivo kaj la verkado de Eroŝenko. La japanoj eldonis lian tutan verkaron en kvin volumoj. La saman vesperon en la nomo de Internacia Ligo de Esperantistoj-Fotoamatoroj (ILEF), kies prezidanto estas sinjoro Dončo Hitrov el Bulgario, mi emnangas la premion al sinjoro Kaoru Asaoka, gajninta la unuan lokon en la filma konkurso, okazinta en la kadro de la 68-a UK de Esperanto en Budapeŝto 1983.

Osaka estas la dua laŭ grandeco urbo en la lando de la leviĝanta suno. Ĝi estas forte evoluanta industria centro kun multe da fabrikoj, bankoj, magazenoj, kun vigla surtera kaj subtera trafiko kaj kun tre malpurigita aero.

(Daŭrigota)

NI PAROLU IOMETE EN ESPERANTO

En la biblioteko de la moskvano Boris Tokarev, scienculo-kemiisto, troviĝas libroj ne nur en rusa lingvo, sed ankaŭ en angla, germana, japana. Tamen ne ĉiuj liaj libroj estas senpere ligitaj kun la kemio. Temas pri esperantaj eldonaĵoj.

— Antaŭ dudek ses jaroj en ĵurnalo „Rabotnica“ („Laboristino“) mi tralegis noton pri la Internacia Lingvo — rakontas Tokarev.

— Mi ekinteresiĝis, aĉetis „Esperantan-rusan vortaron“. Ĝi estiĝis la unua libro en la esperanta fako de mia biblioteko.

La esperanta libro-kolekto de Tokarev estas unu el la plej riĉaj en nia lando. La scienculo mem fariĝis estrarano de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE), dumviva membro de Universala Esperanto-Asocio (UEA).

— La Internacia Lingvo estas ne nur ri-

medo por interŝanĝo de informoj inter la popoloj — substrekis Boris Tokarev — sed ankaŭ perfekta pont-lingvo inter malproksimaj, malsimilaj unu al alia naciaj lingvoj. Pere de Esperanto, ekzemple, oni tradukis en ĉinan lingvon versojn de Majakovskij, novelojn de Puŝkin, verkojn de Gogol kaj Gorkij, en la japanan — verkojn de Leo Tolstoj kaj Turĝenev.

Nun en la lando funkcias pli ol ducent kluboj de esperantistoj. Iliaj membroj lernas la lingvon, legas referaĵojn, korespondas kun esperantistoj el aliaj landoj kaj eĉ prezentas spektaklojn en Esperanto. Ĉi-jare aperos nova lernolibro de Esperanto.

(El „Moskvaj novaĵoj“,
n-ro 30/84)



MIĤAIL ĈOBANOV

RENKONTIĜO

(Teatraĵeto por infanoj)

DIANA: (aperas de dekstre): — Ho, kiel agreble estas al mi renkonti esperantistinojn!

LENA: (Venas de maldekstre kaj haltas meze de la scenejo, sur ŝia brusto brilas verda stelo) — Ĉu ankaŭ vi estas esperantistino? Tre bone, ke vi haltigis min. Kia estas via nomo?

DIANA: — Diana.

LENA: — Mia nomo estas Lena (ridetante, la du knabinetoj manpremas).

DIANA: — Ĉu vi konas tiun kvartalon?

LENA: — Jes, mi loĝas sur strato „Oboriŝte“.

DIANA: — Mi volas viziti la artan galerion sur strato „Sipka“, sed mi ne scias la numeron.

LENA: — Mi plezure helpus al vi, sed tie ĉi mi atendas samklasaninon. Jam pasis kvin minutoj post la fiksita tempo, se vi deziras atendi kun mi ankoraŭ kvin minutojn, mi kondukos vin al la ekspozicio, eĉ ankaŭ mi trarigardos ĝin. Delonge mi deziras fari tion.

DIANA: — Bone, mi restos ĉe vi, por ke ni kune vizitu la ekspozicion — nun tie estas prezentitaj bildoj de nia fama pentristo Vladimir Dimitrov — la Majstro.

LENA: — De kie vi scias tion? Mi loĝas proksime de la ekspoziciejo, sed mi ne rimarkis la afiŝon.

DIANA: — Mi loĝas en tria Sofia subdistrikto, kiu portas la nomon de Georgi Dimitrov — sur strato „Paisij“. En la lernejo ni havas rondon de pentrado, kiu ekfunkciis ĉi-jare. Ni jam vizitis la Nacian Artgalerion. Ĝi troviĝas kontraŭ la maŭzoleo de Georgi Dimitrov. Kaj nun ni intencas viziti ankaŭ la galerion sur strato Sipka. Mi respondecas pri tiu vizito, tial mi volas anticipe vidi kaj scii ĉion.

LENA: — Ho, vi pravas — jen tie estas gluita afiŝo kun portreto de la Majstro.

DIANA: — Ĉu en via lernejo estas rondeto de pentrado? Ni povas inviti vin gastigi al ni. Tiun taskon mi havas en mia laborplano —

renkontiĝo kun simila rondo en alia urba subdistrikto.

LENA: — Eble tion povas aranĝi nia instruistino. Tamen mi ne partoprenas tiun rondeton. Mi vizitas la dram-rondeton. Ni havas kiel gvidanton unu reĝisoron, kaj jam kelkfoje ni partoprenis la artan programon de lernejaj solenaĵoj.

DIANA: — Ho, estos tre interese, se vi povus gastigi al ni...

LENA: — Kiam ni partoprenis la solenaĵon okaze de la Novjaro, ni donis tutan spektaklon.

DIANA: — Spektaklo! Tio tre plaĉas al mi! Kaj kion vi prezentis?

LENA: — Ni prezentis la teatraĵeton „Antaŭnovjara nokto“. Estis Avo Frosto, Neĝulino, leporetoj, la dekdu monatoj, paseroj-leterportistoj, Avino Urso, la nanetoj kaj la Novjaro.

DIANA: — Verŝajne vi estis Neĝulino?

LENA: — Ne, mi estis la Novjaro. Se vi scius, kiom ridindaj estis la nanetoj. La reĝisoro elektis ilin el la tuta lernejo — malaltaj, sed viglaj infanoj, kaj ĉiuj — kun grandaj, longaj barboj, kun ruĝaj kapuĉoj, kaj ĉiuj en bluaj sakpantalonoj, ruĝaj botoj kaj flavaj manteloj. Ili senĉese stumblis en la piedoj de la monatoj aŭ de Avo Frosto. Ili ege plaĉis al la publiko, kiu entuziasme kriis: brave, brave, nanetoj!

DIANA: — Ankaŭ mi tre ŝatas komediajn spekraklojn. Kune kun miaj gepatroj mi ofte vizitas la cirkon.

LENA: — Ho, cirko?! Mi tre ŝatas cirkon... Foje — tiam mi estis en la kvara klaso, — paĉjo kondukis nin al cirko... Estis tre interese, mi neniam forgesos unu humuran sceneton. (emociiĝinte). Mi nun rakontos ĝin al vi — aperis komikulo kaj serĉas iun sur la areno: — Kie li estas? Ĉu vi ne vidis lin? — Sed kiun? — demandis iu el la publiko. — Peĉjon! Kiun alian! — respondas la komikulo. — Jen mi venas, mi venas — krias iu el ekstere, ankoraŭ nevidebla. Aperis kurante ankoraŭ unu komikulo kaj demandas: — Kial vi vokas min? Mi havas gravan laboron! Kaj la alia diras: — Bone, mi ne okupos vin longe. Diru al mi, kio estas tio. — Kio? — demandas Peĉjo. La alia desegnis sur la planko kvadraton kaj diras: — „Peĉjo! Peĉjo respondas: “Jes“. — Peĉjo! Vi estas saĝa kaj inteligenta knabo! Peĉjo diras „jes!“ — Ĉu vi vidas tiun kvadraton? — Jes! — respondas Peĉjo. Bone! — daŭrigas la alia. — Diru al mi, kia ĝi estas. — Ronda, — respondas Peĉjo. (La knabinetoj ridas).

LENA: — Atendu, estis ankaŭ alia sceneto. Se vi scius, kiom ridinda ĝi estas! (Rigardas sian horloĝon!) — Ho, la tempo pasis kaj mia amikino ankoraŭ ne venas! A, jen kie ŝi estas (Vokas): — Ani, Ani, restu tie, ni venos! (Al Diana): — Ni kune iros al la ekspozicio.

LENA: — Vi tre bone parolas Esperanton, kie vi lernis ĝin?

DIANA: — Mia avo instruis ĝin al mi. Revenante hejmen, li vokas laŭte: — Diana, donu al mi la pantoflojn! Mi donas al li la pantoflojn kaj li diras: — Diana, ĉu vi ŝatas ĉokoladon? Mi respondas al li bulgarlingve, ke mi ege ŝatas ĉokoladon. — Mi ne komprenas vian lingvon! Diru Esperante! — li diras. Kaj mi respondas Esperante. Tiel iom post iom li instruis min, poste instruis min skribi,

legi kaj nun mi estas preskaŭ esperantistino. Kaj vi? Kiu vin instruis? Ĉu via avino?

LENA: — Jes! De kie vi scias tion? (La knabineto ridas!) Mi tre amas ŝin. Si estas grava figuro en la esperanta movado.

Rimarko:

Lena, parolante pri la komediistoj, volas prezenti ilin per voĉa karakterizo, ekzemple per troigita baso Peĉjon, kaj per diskanta voĉo la alian.

enlanda movado

SOLENA E-ARANGO

La 13-an de februaro, en la Sindikata Kulturdomo en loĝkomplekso „Druĵba“ okazis solena kunveno dediĉita al la 100-jara jubileo de Esperanto kaj al la 40-a datreveno post la venko super faŝista Germanio. Ĝi estis unua komuna iniciato de la subdistrikta konsilantaro por popola klerigo, de la subdistrikta konsilantaro por kulturo kaj la Sofia Esperantista Kulturdomo „M. Gorkij“.

K-do Lozanov, vic-estro de subdistrikto „Iskâr“ malfermis la kunvenon per mallonga parolado pri la bulgara kaj tutmonda E-movado. Inter la membroj de la prezidantaro estis ankaŭ Ivajlo Dimitrov — vicprezidanto de la Subdistrikta Konsilantaro por Popola Klerigo. Kunĉo Vălev, ĝenerala sekretario de BEA, en sia raporto „Esperanto en servo de la paco kaj amikeco inter la popoloj“ substrekis, ke la Internacia Lingvo estas aktiva kaj efika rimedo por amikeco kaj interkompreniĝo de la popoloj, kaj la noblaj celoj, al kiuj servas nia movado, estas allogaj por multaj homoj en la mondo. Per Esperanto ili etendos al si la manojn por kune agi por konservo de la mondpaco.

D-ro Cveta Stamenova, prezidantino de UE de BEA, donacis al la reprezentantoj de la subdistrikta konsilantaro por popola klerigo kaj por kulturo librojn (en bulgara lingvo kaj en Esperanto) pri la bulgara kaj tutmonda

E-movado. Si esprimis esperon, ke la kunlaborado de BEA kaj la amasaj organizaĵoj en la nova subdistrikto „Iskâr“ disvolviĝos sukcese.

La iniciatkomitato de la esperantistoj loĝantaj sur la teritorio de subdistrikto „Iskâr“ enmanigis Alvokon-promeson lige kun la 100-jara jubileo de Esperanto. Tio estas alvoko por fondo de subdistrikta societo de esperantistoj kaj amikoj de Esperanto, por aktiva klariga laboro kun gelernantoj en la subdistrikto, kun celo altiri ilin al fakultativa lernado de Esperanto, por organizo de angulo „100 jarojn Esperanto“ en la nova parko.

Riĉan literaturan-muzikan programon prezentis artistoj el la ĉefurbaj teatroj: la humoristoj Hindo Kasimov kaj Vasil Popov, la juna kantistino Alesia Nalbantova. La merita aktorino Luna Davidova deklamis en Esperanto „La vojo“ de Zamenhof kaj Veselin Damjanov plenumis en Esperanto sian kanton „Krokodiloj“.

VERA RAJKOVSKA

ĈE ŜOPOJ* — ESPERANTISTOJ

La 26-an de oktobro pasintjare societo „Solidareco“ en u. Bankja, kune kun la loka legosocieto organizis pridiskuton de la tre populara lastatempe libro „Ni ne estas de nun — la vivofilozofio de ŝopo“. La aŭtorino Elena Ognjanova respondis al la multnombraj demandoj de la ĉeestantaj legantoj. Parolis la publicisto D. Damev — direktoro de eldonejo „BZNS“ („Bulgara Agrarana Popola Unuiĝo“) kaj la literatura kritikisto Aleksandăr Pindikov — prezidanto de la Klubo de Intelektuloj-Kreantoj en Bankja.

Oni proponis, ke la libro estu tradukita en Esperanton.

Fine la aŭtorino rakontis pri sia lasta baldaŭ aperonta libro „Ni la ŝopoj“. La estraro de la legosocieto donacis al Elena Ognjanova belan albumon kun bondeziro, ke ŝi plu verku pri siaj bonaj amikoj — la ŝopoj.

BORIS ATANASOV

Ŝopoj — reprezentantoj de etna popola grupo, kiu loĝas en la regiono ĉirkaŭ Sofio. La ŝopoj estas proverbaraj per sia humuro, sagaco kaj sprito.



Parolas K. Vălev



BULGARIO

Vera Rajkovska (22-jara studentino) — 1606 Sofio, str. „Dimo Haĝidimov“ 39 — deziras amikan korespondon kun eventuala reciproka gastado — kun USSR kaj aliaj landoj.

MONGOLIO

Batzaya (19-jara laboristo, fraŭlo) — Ulan-Bator, Central post, post kesto 733 — kun ĉi pri sciencifikio, biologio, cibernetikio, astronomio kaj angla, franca, germana kaj rusa lingvoj.

POLLANDO

Lidia Sieminska (21-jara studentino) — ul. Cieplicka 5/3, 85—377 Bydgoszcz — pri literaturo, turismo, muziko, historio kaj geografio — kun ĉi.
Esperanto-klubo „Abelujo“ — ul. Polna 34/84, 85—163 Bydgoszcz.

Wiestaw Kot (25-jara studento) — KTM. PCT. ul. Zwierzyniecka 7, D. S. „Jowita“, 60—813 Poznań.
Tomasz Stusznik (13-jara) — ul. E. Oneshhowej 42/8, 50-311 Wrocław.

SOVETIO

Vladimir Gibra (32-jara oficisto) — Moldavio, u. Florești, pk 10 — pri muziko, filmoj, literaturo, kolektas BK, revuojn k. a.

STIPENDIO „100 JAROJN ESPERANTO

Laŭ iniciato de la Urba Estraro de BEA — Sofio, estis fondita stipendio „100 jarojn Esperanto“, dediĉita al la centjara jubileo de la Internacia Lingvo. Tiamaniere oni kunigas la propagandadon de Esperanto inter la estontaj filologoj kun la preparado de novaj instruistoj.

Nun la stipendion ricevas tri gestudentoj el la Filologia Fakultato de la Sofia Universitato „Kliment Ohridski“. Du el ili estas en dua kurso, kaj unu — en unua kurso. La stipendiantoj jam lernas Esperanton, membras en la urba junulara societo kaj estas bonaj studentoj. Post fino de la studado ili sin devigas dum kvin jaroj instrui Esperanton en la lernejoj, en kiuj ili laboros.

La sofia UE de BEA donas bonan ekzemplon. Ankaŭ la distrikta estraro de BEA devus uzi tiun manieron por engaĝi instruistojn de Esperanto el superaj lernejoj en la distriktaĵoj.

M. BOJAĜIEVA

Ĉefredaktoro: Dončo HITROV

Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BAĈEV, Vasil BOROVSANSKI, Radoslav DOJĈINOV, prof. d-ro Kiril POPOV, Dimitar HAĜIEV, Krăstju KARUCIN.

Administranto — Asen JOSIFOV

ENHAVO

*** La homo — tiu ĉefa forto.	II
Ĥr. GOROV. BEA sur nova vojo	1
H. LEVI. Esperanto kaj junularo	2
M. JANKOVA. Konferenco pri junularaj problemoj	3
M. CONKOVSKI. 40 jarojn Asocio de Sciencaj Laboristoj en Bulgario	3
P. LAZAROVA. La sorto de E-lernolibro	4,5
C. MURGIN. Nova eldono de Poezia E-Antologio	5, 6
V. LAEVA. Batalanto kontraŭ obskurantismo kaj faŝismo	7, 8
M. EVVA. Esperanto-turismo por neesperantistoj	10, 11
Il. KOUTNY. Kio estas komputilo?	11
V. CVETKOVA. Japanio — malproksima kaj proksima	13, 14
M. ĈOBANOV. Renkontiĝo	15
*** Enlanda movado	16
*** Deziras korespondi	III
*** Distroj	IV

KUNLABORANTOJ, ATENTU!

Se vi volas sendi kontribuojn por „BE“, ĝi estu konciza, verkita en bona lingvo, klare tajpita aŭ mane skribita, kun duobla interlinia spaco kaj margeno (sen mallongigoj, sen tutaj vortoj tajpitaj per majuskloj). La materialoj ne estu pli longaj ol 60 tajpitaj linioj, nur en tre gravaj kazoj — ĝis 90 linioj, sur blankaj paperfolioj de normala formato. Ĉiu tajpita linio konsistu el 65 tajposignoj (inkluzive la intervortajn spacojn).

La Redakcio akceptas la originalan (unuan) ekzempleron de la tajpaĵo, ne la kopion. Skribu klare viajn nomon kaj kompletan adreson en nacia lingvo!

Korespondantojn pri okazintaj aranĝoj oni sendu ĉiam tuj post la aranĝo. La grupfotoj estu interesaj, movoplenaj, bonkvalitaj (prefere nigra-blankaj), en postkarta formato.

Limdato por kontribuoj: la materialoj venintaj ĝis la 15-a de ĉiu monato, aperos en „BE“ post du monatoj.

La redakcio ne resendas manuskriptojn kaj fotojn!

DISTINGITA POETO

Antaŭ nelonge la E-poeto kaj veterano-esperantisto Boris Kavalĝiev el Ruse sendis kelkajn siajn verkojn en la italan urbon Modica (Sicilio), kie la Internacia Akademio pri Literaturo kaj Arto „Kontea di Modica“ organizas ĉiujare konkurson por E-poezio.

Ni ĝojas informi, ke Boris Kavalĝiev estis distingita per kvara premio en la konkurso de la Akademio pro lia versaĵo „Averto“, dediĉita al la pachtalo.

„BE“

Sur la unua kovrilpaĝo: Popolmuzikistoj
Foto: Lada Milkova

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Cirilo kaj Metodjo“ — I grado
Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:
„BULGARA ESPERANTISTO“
Bul. Ĥristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario P. K. 66
tel. 31-70-19 1 000 Sofio
Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

distro

AFORISMOJ DE LA KARTVELA POETO SOTA RUSTAVELI

Sur amboso plumba oni rompas ŝtonon kaj topazon.

Fia homo aĉan vorton ĉiam kun plezuro diras.

Kiam rozo forvelkinta en ĝardeno plu ne belas,
Baldaŭ sur la sama branĉo nova floro reaperas.

La ĝeidoj de leonoj egalrajtaj estas ĉiam.

Perfidulon la bonkora malavaro ĉiam venkas.

Ne sen peno oni trovas sur marfundo perlon.

Kiu ĝojas kaj kontentas nur pri vivo efemera,
Ne evitos li perfidon de la mondo ĉi severa.

Ĉiam spur' en vivo restas de bonfaro kaj de virto


Kuracisto se malsanas, se li estas eĉ plej fama,
Li al si alian vokas, ke lin tiu faru sana.

La konsil' de aliulo pli utilas, se ne vana.

Saĝa hom' centfoje pensas, nur stultulo unufoje.

La amiko por amiko estas ĉio en la mondo:
Koron por la kor' fordonas, amo devas esti ponto.

Jurrompul' neniam venkas, ĉar sukceson li ne indas.



— Gratulon! Estas knabo!
— Ĉu esperantisto?

Anekdotoj

BILETO

Pasaĝero, kiu dum jaroj vojaĝadis per la loka vagonaro kaj posedis jaran trajno-bileton, kredis esti jam tiel konata persono, ke li ne bezonis montri sian bileton al la konduktoro.

Unu tagon tamen venis nova konduktoro, kiu petis lin montri sian bileton.

— Mia vizaĝo estas mia bileto — diris la pasaĝero aroge.

La konduktoro demetis sian jakon kaj kometis refaldi la manikojn de sia ĉemizo.



— Bone, — li diris, — mia devo estas stampi ĉiujn biletojn.

INTER FIŜKAPTISTOJ

— Ĉu bona fiŝakvo estas ĉi tie?

— Bonega! Neniu fiŝo volas eliri el ĝi!
(El la libro „La mondo ridas“)

ĈU VI ESTAS OBSERVEMA?



Malkovru la sep diferencojn inter la pentraĵoj.